

# Kreint' de l' kosmo, Eternul'

## DEUS, CREATOR OMNIUM

1. Kre - int' de l' kos-mo, E - ter - nul',  
2. ke for - ton no - van gaj-nu - ni

Vi mem la or - do de l' ste - lar',  
por ni - aj mem-broj, ni - a mens',

Vi mem la hel' de - ni - a tag',  
por ke ne res - tu - ni en - lac',

Vi la ri - poz' de - ni - a nokt',  
nek tris - to pre - mu - nek an - gor'.

3. Pro tago ĉi ni dankas Vin,  
al ni ĝin donis Via grac'.  
Al Via gloro levas nun  
vesperan himnon ni laŭ vot'.
4. Al Vi malfermas sin la kor',  
Vin kante benas nia voĉ',  
humile servas la spirit'  
al Vi kun amo kaj ador'.
5. Nun la profunda nokt-malhel'  
finiĝon metas al la tag';  
sed per la kredo, sen obskur',  
heliĝos nia nokt' en bril'.
6. Al Vi, ho Patro, estu glor',  
al Vi, ho sam-substanca Fil',  
al Vi, Spirito, Paraklet',  
reganta ĉiam, en etern'.  
(Amen.)

*Alia melodio:*

1. Kre - int' de l' kos - mo, E - ter - nul',  
2. ke for - ton no - van gaj - nu ni

Vi mem la or - do de l' ste - lar',  
por ni - aj mem - broj, ni - a mens',

Vi mem la hel' de ni - a tag',  
por ke ne res - tu ni en lac',

Vi la ri - poz' de ni - a nokt',  
nek tris - to pre - mu nek an - gor'.

*6a strofo:* A - men.

M: Antiphonale p. 737, 920